

Heinrich Heine, Milde fluas tra la kor'	Heinrich Heine, Softe vibras tra l'anim'	Heinrich Heine, Frühlingsbotschaft	Heinrich Heine, Printempa saluto
<i>tradukita de Valentin Melnikov</i>	<i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>		<i>tradukita de Ludwig Emil Meier</i>
Milde fluas tra la kor' kanto primavera. Flugu, melodi- sonor', en la vast' aera.	Softe vibras tra l'anim' melodi' tenera, flugu al la malprok- sim', kanto primavera!	Leise zieht durch mein Gemüt Liebliches Geläute Klinge, kleines Frühlingslied, Kling hinaus ins Weite.	Iras ĉarma sonoret' Tra de mi animon. Sonu printemo kan- tet' En la malproksimon!
Flugu longe, sen ri- poz', super domoj flutu. Se troviĝos tie roz' – ĝin de mi salutu.	Flugu al florbeda dom', kaj se tie ĉarme ridos roz', en mia nom' ŝin salutu varme.	Kling hinaus, bis an das Haus, Wo die Blumen sprießen, Wenn du eine Rose schaust, Sag, ich laß sie grüßen.	Ĝis la dom' forsonu vi, Kie floroj pendas! Diru al la roz', ke mi Saluteton sendas.
...

Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.

Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)

Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov>.

Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html>.

Vi-
du ankaŭ: <http://www.esperanto-mv.ru/Melnikov/index.html>.

Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).

Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)

El la poezia volumo "Kanzonoj de Heine".

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17).

Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)

Tiu ĉi poemo troviĝas interalie ankaŭ en la reta kolekto "Gutenberg.Spiegel" sub http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xid=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb_found.

Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 - †1919) en 1908.

Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)

Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuŝe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [lars.kromann@mail.dk]. Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedia retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier. Li verkis interalie la kant-libreton "Esperantista Kantaro", kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.